


KOMENCANTO 1

gazeto por komencantaj espezantistoj kaj komencantaj aŭtoroj



KOMENCARTO

1998 numero 1
fondita en 1992
8 numeroj jare
redaktas kaj eldonas:
Viktor Kudrjavcev
konstanta kunlaboranto:
Rafija Jafasova
adreso: 620041, Ekaterin-
burg, ab. ja. 132, Ruslando
abontarifo por 1998:
internacia tarifo:
24 nederlandaj guldenoj aŭ
12 usonaj dolaroj
orienteŭropa kaj latiname-
rika tarifo:
10 usonaj dolaroj
konto ĉe UEA: vkud-a
ruslanda tarifo:
32 (000) рублей (за 8 но-
меров в год) простым
почтовым переводом на
имя Кудрявцева Викто-
ра Васильевича: 620041,
Екатеринбург, аб. ящ.
132

PERANTOJ de**KOMENCARTO**

laŭ ĉi-subaj adresoj vi po-
vas aboni nian gazeton

ESTONIO

Virve Ermits, Mahla 65 —
1, EE — 0012, Tallinn

SVEDIO

SEF, Lisbet Andréasson,
Södra Rörum pl 455, SE —
24294 Hörby

SVISLANDO

Christoph Scheidegger, Im
Schleedorn 6, CH — 4224
Nenzlingen

UKRAINIO

Dmitrij Cibulevskij, ab.skr.
9307, UA — 310003,
Ĥarkiv

Historiaj studoj de Э

Rimarkinda florado

Estas interese ekmemori, ke en 1900 la tuta esperanta literaturo konsistis ankoraŭ el 150 libretoj kaj du monataj revuoj: L'Esperantiste kaj Lingvo Internacia. Sed la postaj jaroj vidis rimarkindan floradon de diversaj periodaĵoj.

En 1902 kaj 1903 fondiĝis en multaj landoj de Eŭropo kaj Ameriko propagandaj societoj kaj esperantistaj gazetoj.

En Bulgario aperis **Rondiranto**, redaktata de s-ro Oreškov.

En Kanado **La Luno**, kie vigle propagandis abato Solis, s-roj Beauchemin kaj Saint-Martin.

En Belgio **Belga Sonorilo** (1902-1908) kun kapitano Lemaire kaj s-ro Jamin, kiu organizis dokumentejon en la Antverpena Ekspozicio en 1902.

Holanda Pioniro, (1902-1921) fondita de s-ro Bulhuis en Hilversum.

Espero Katolika, de la franca abato Peltier.

Suno Hispana (1903-1927) de s-ro Codomiu en Valencia.

Antaŭen Esperantistoj! de profesoro Vallareal en Peruo.

En Moravio laboris s-ro Ĉejka, kiu eldonis en Bystrice-Hostyn kun helpo de s-roj Krumpholc kaj Šildo tri gazetojn: **Revuo Internacia**, **Der Deutsche Esperantist** kaj **Bohema Esperantisto**.

En Italio grafo Albert Gallois fondis la Italian Societon por la propagando de Esperanto kaj ĝian organon **L'Esperantista**.

En Anglio Esperanto restis longe nekonata. La unuan societon fondis en la urbo Keighley s-roj J. Rhodes kaj J. Ellis. En januaro de 1903 stariĝis la Londona Klubo. Fraŭlino Lawrence kaj junulo H.B. Mudie donis al ĝi organon **The Esperantist**, poste **The British Esperantist**, kiu ekzistas ĝis

hodiaŭ sub la titolo **La Brita Esperantisto**.

En Germanio samtempe aperis kaj bone funkciis ĝis hitleraj tempoj **Germana Esperantisto**, altnivela kaj tre regula propaganda kaj asocia periodaĵo.

En Svislando en komenco de 1903 sinjoro Renard fondis la Svisan Societon kun revuo **Svisa Espero** (1903 — ĝis hodiaŭ)

En Ĝenevo Edmond Privat kaj Hektor Hodler aperigis **Junan Esperantiston** por disvastigi korespondadon inter junularo.

1906 en Svedio estis fondita **La Espero**, kiu ekzistas ĝis hodiaŭ.

Brazila Esperantisto aperis la unuan fojon en 1907 kaj vivas ĝis nun.

1906 naskiĝis **American Esperanto Magazine**.

La unua numero de **Pola Esperantisto** aperis en 1908

Sanjare aperis **Franca Esperantisto**, kiu escepte kelkajn paŭzojn funkcias ĝis hodiaŭ.

Hungara Esperantisto debutis en 1909


Argentina Esperantisto - 1917,

Esperanta Finnlanda - 1920,

Bulgara Esperantisto - 1919,

En Japanio ekaperis en 1919 **La Revuo Orienta** kaj aperas ĝis hodiaŭ.

(Laŭ la materialoj kaj fontoj el "Historio de la lingvo Esperanto", "Esperanto en perspektivo", Enciklopedio de Esperanto")



La sekva numero de
KOMENCARTO aperos
la 1-an de marto 1998

DANKON! Al al sinjorino **Micheline DEMONTOUX** (Bordeaux, Francio) pro la donaco \$10 kiel kontribuo por **KOMENCARTO**

Abonebla ĉe Landaj Perantoj - 28\$
mendu provnumeron ĉe la redakcia
adreso:

CP 237, 6830 Chiasso 1, Svislando

Abonado por Rusio: petu informojn
620077 Jekaterinburg, ab.aj 67

HEROLDO

DE ESPERANTO

LA INTERNACIA SENDEPENDA GAZETO DE LA ESPERANTO-MOVADO

16 numeroj jare * aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo * junulara, instruista, literatura rubrikoj *
librorecenzoj, kalendaro de pli ol 250 internaciaj renkontiĝoj * anoncetoj, foto-filmo.

Unu el la plej gravaj kaj popularaj internaciaj
novaj-gazetoj en Esperanto.

La gazeto estas plene sendependa kaj havas
tre interesan historion. Dum 76 jaroj (ĝis la fino
de 1996) de sia ekzisto ĝi ŝanĝis nur 2
redaktorojn! Estas vere unika kaj nekomparebla
fakto. Ambaŭ tiuj personoj estas elstaraj figuroj
en la Esperanto-movado kaj certe meritas apartan
rakonton.

La gazeton fondis en aprilo (novembro) de
1920 Teo Jung.

Teo Jung - (Theodor Karl August Heinrich Jung),
germano, nask. 21 dec. 1892 en Meckenheim, en
malriĉa familio. Eprerantiĝis 1909-1910. Fervora
esperantisto, multe aktivis en Germanio. En 1920 fondis
semajnan ĵurnalon "Esperanto Triumfonta". Ekde la
unua numero de 1925 la ĵurnalo ricevis nomon
"HEROLDO de Esperanto".

Abonantaro ek de 500 ekzepleroj komence
atingis 2000 — 3000 poste. Ĝis 1928 "HdE"
aperis en *Horrem apud Köln*, poste en *Köln*.

En julio de 1936 Teo Jung elmigris al
Nederlando, ne dezirante obei al ordonoj de
Gestapo kaj tie rekomencis eldoni ĵurnalon sub
(mal)nova titolo "Esperanto Triumfonta". Tamen
la gazeto devis ĉesi aperi en 1940, por ree ekaperi
en 1946.

Ekde la komenco de 1962 jaro redaktadon de
'HdE' transiris de Teo Jung al Ada Fighiera-
Sikorska, kiu redaktis la gazeton dum 36 jaroj ĝis
sia forpaso la 7-an de aŭgusto 1996.

Ada Figueira -Sikorska naskiĝis la 26-an de januaro
1929, vivis kaj studis en Varsovio ĝis la militeksplodo en
1939, la familio fuĝis en Lvovon, la patro, pola generalo
Sikorski, defendis la urbon kaj post ĝia kapitulaco estis
internigita en Siberion. La patro estis mortpafita de
stalina reĝimo en Kattyn, kaj Ada kun la patrino kaj la
fratino tra Samarkand kaj Teherano en novembro de
1948 revenis en Pollandon. Ŝi finis la fakultaton pri
slavistiko en Varsovia Universitato, en 1956 ŝi vizitis
kurson de Esperanto, kiun gvidis famega esperantisto
Julio Baghy. Tiam komenciĝis ŝia amo al Esperanto.

En 1958 ŝi estis vicprezidanto de la Varsovia
Esperanto-societo kaj partoprenis en preparado de la
vica Universala Kongreso en Varsovio. Tiam ŝi
konatiĝis kun italo Gian Carlo Fighiera, al kiu edziniĝis
en 1960 en Bruselo. La geedzoj interparolis nur en
Esperanto dum 38-jara geedza vivo!

Repreninte el la manoj de Teo Jung
redaktadon de "HdE" Ada redaktis la gazeton
dum 17 jaroj en Bruselo, poste dum 9 jaroj en
Madrid, fine, ekde 1988, en Torino, Italio.

Ŝi estis membro de TEĴA (Tutmonda
Esperantista Ĵurnalista Asocio), EVA (Esperantista
Vegetarana Asocio), Esperanto PEN-KLUBO,
Monda Turismo, honora membro de UEA.

En la lastaj tempoj Ada esprimis la deziron
rezigni pri la eldonado de la gazeto kaj decidis
transdoni ĝin al Kooperativo Literatura Foiro.
Ekde la 1-a de januaro 1997 "HdE" posedas,
eldonas, administras LF-Koop. Redakcio: Perla
Martinelli, Marco Picasso, Giorgio Silfer, kun la
kunlaboro de Gian Carlo Fighiera

Al tiu momento la 67-jara Ada Figueira-
Sikorska redaktis la gazeton seninterrompe dum
36 jaroj, ekde la januaro de 1962 ĝis la fino de
1996. Dum tiu periodo ŝi tutsola prizorgis la
aperon de la gazeto kaj ĝin administris,
funkciante kiel unupersona stabo.

Dum la ĝisnuna periodo "Heroldo" restis fidela
al principoj inspiritaj, ek de 1920 de ĝia fondinto:
la gazeto gardas popularan kaj ĉefe informan
karakteron; ĝi estas sendependa de esperantistaj
organizoj, neŭtrala ne nur laŭ la spirito de la
Deklaracio de Esperantismo de 1905, sed ankaŭ
rilate la movadajn pensofluojn kaj konceptojn.
Alivorte, "Heroldo" estas nek registara nek
opozicia. Sed vere utila kaj interesa. Tiel estos
ankaŭ estonte.

(Preparita laŭ "Enciklopedio de Esperanto", kaj
artikoloj en "HEROLDO de Esperanto".)

Verkis N. Parŝin

Esperantigis Timur MORGUN

TROVU VIAN PORDON

Mi bedaŭris, ke demandis lin, ĉar al mi estis donita tia informo, kiun nun mi scias, kaj pri kiu ne tre volas rememori.

— Nu, bone, bone — ruĝa kiel kankro murmuris mi — vi rakontu, kio al vi okazis, kiam vi perdis la vojon?

— Vi komprenas — ekrakontis li — al mi okazis ĝi en la jaro 1997 kaj de kiam mi unufoje perdis la vojon pasis ne malmulte da tempo, sed kiom — mi ne scias.

Komence, ĉirkaŭ duonjaron, mi vojaĝis tra la tuta urbo, poste mi vizitadis verŝajne ĉiujn urbojn de nia lando kaj mi estis en fremdaj landoj. Laŭ mi ŝanĝiĝis jam mil pordoj, ekster ĉiuj mi estis dum kvin tagoj, kaj poste denove mi serĉis mian pardonon. Tamen ĝi estis nur duono, ĉar vizitinte nuntempe ĉiun lokon, kiun mi povas, mi ekvojaĝis tra la tempo kaj paralelaj mondoj. Vi verŝajne ne kredas min, sed mi ne mensogas — li kruciĝis — mi mem vidis kiel mortadis Kristos sur la kruco.

Mi nur mirigite alfajfis.

Unufoje, - daŭris li — mi okaziĝas en la paralela mondo, kie homoj estis en la energetika nivelo de ekzistado kaj en korpa ŝelo restadis nur la plej furiozaj oponentoj de progresco, gloron al Dio, ke mi okaziĝis ĉe ili kaj konatiĝis kun la fraŭlino...

— Aŭskultu min — interrompis mi lin — kial vi aperis ne home, el la ŝranko.(?)

Ofendita, ke liaj rememoroj estis rompitaj, li demandis min — kiel vi pensas, en la muro, kie staras la ŝranko, estis la pordo?

— Ŝajne...

- Ŝajne, ŝajne - kolere mokimitis min Ingvar, — ne ŝajne kaj ĝi estis, sed ĝin enmurigis.

Nuntempe ekpensu, mi povas eniri ĉiun pardonon, ĉu? Ĉiun! Kaj ankaŭ enmurigitan, tial kaj la ŝranko pretersaltis, kaj reen mi ne povas — li eksipis, mi jam provadis.

Mi ekrigardis horloĝon, — patrino mia, — la kvina horo de mateno! Ingvar observis mian rigardon kaj diris:

Certe mi ĝis mateno povas babilu, — li oscedis — sed mi, interalie, ankaŭ dormi deziras. Pri kio mi volas vin peti — malfermu kaj forte fiksi ĉiujn pordojn, kaj ankaŭ en necesejo, aliel oni denove min forportos, nun dio scias kien. Aŭskultu min, mi intertempe preferas dormi vestita, post kiam unufoje en la 16-a jarcento, mi amuziĝis kun monakinoj en unu monaĥejo kaj subite aperis monaĥejestrino! Mi forkuris kiel estis vestita, supozinte, ke trafos ien, kie pli varmos, sed trafis al tendo de Piri, kiu estis ĉe la Norda poluso!

Mi montris, ke li povas dormi kaj deziris al li "Bonan nokton!" Kaj mem ankaŭ iris dormi. Dum la tuta tempo, kiun Ingvar pasigis kun mi, ni parolis pri liaj vojaĝoj, pri miaj aventuroj, kaj pri ĉio, pri kio oni povas, eĉ ne... Mi sukcesis klarigi kelkajn detalojn, kiuj permesis esperi pri senbazeco de mia fato.

Li malaperis post kvar tagoj. Pro trablovo batfermis pordo de salono, lasita sen atento. La lasta, kion mi vidis, estis silueto de Ingvar kaj malleviĝanta tenilo de porda seruro, kiam kun sonora fingroklako la tenilo stariĝis loken, trans la pordo neniu estis. Ĉio finiĝis. Mi tre bedaŭris, ĉar li estis nemalbona junulo. Se mi estas li, do mi plaĉas al mi.

Kiam mi metis punkton, do mi pensis, ke per tio ĉi finiĝas, okazis tute ne tiel. Pasis kvin jaroj kaj mi sukcesis forgesi pri tio. Mi rememoris poste, kiam mi konatiĝis kun pentristo, kiu en tago de mia naskiĝo donacis al mi sian lastan pentraĵon. Sur ĝi estis pentrita en la plej malgrandaj detaloj — fortika pordo kverka.



Aŭtunaj motivoj

Malgraŭ ke tiu ĉi numero aperas en januaro, en la subkvataj landoj proksimiĝas aŭtuno, ĉu ne?
Kaj en ĉiu sezono estas sia bono!

Nekonatulo

(Esperanto-klubo "Gaja krokodilo", Naberejniye Ĉelni,
ab. ja. 133, 423819, Tatarstan, Rusio)

Eŭgeno Ŝiŝkin,

(studas ĉe Viktor Kudrjavecov koresponde, ellernis nur
duonon de elementa kurso! 607220, Avzamas, Parkovaja,
8-51. Niĝgorodskaja obl., Rusio)

AŬTUNO

Aŭtuno. Frostiĝas aero,
Mortas floroj, nudiĝas arbaro,
Korvoj ĵestas, avaras la suno,
Geziĉuloj ripozas ĉe maro.

Pigoj klaĉas, gajadas turistoj,
Lignoĵajro lumigas tendaron,
Ursokavon pretigas uzsino,
Ne zorgante pri bona najbaro.

Dommastzinoj saligas brasikon,
Brue svazmas dimanĉa bazaro,
Mi rigardas en grandan spegalon,
Kaj subite ekzovas blankhazon.

Aŭtuna romano


Sut tiu gazeta tableto
Estas la poto da vino...
Triumŝas amanta poeto:
Bona kaj bela vizino

Ŝajne estas ĝuste la sama!
Versoj de la imagulo...
Absurdo! Cirkulas la ĵamo,
Kvazaŭ mi estas krimulo.

Ne, mi ne kulpas. Azlekeno
Estas vizina somero.
Mia amo, brulas zubeno...
Mia aŭtuna - tenezo...

L.Lukina, E.Lukin (Kvazaŭ fikcia rakonto)

B A R I L O



Ĉu vi estas aŭtoro de tiu scienc-fikcia rakonto "Barilo ĉirkaŭ la Tero"? - redaktoro kun bondezira intereso rigardis vizitinton. -- Jen, kia vi estas... -- Jes..., - ekridis tiu. -- Tia mi estas... -- Tralegis mi vian rakonton. Estas originale. Ŝajnas, nenion similan

ĉe aliaj sciencfikcistoj oni ne renkontis...

-- Ne renkontis, - sible reehis la aŭtoro, - mi estas la unua...

-- Nu, kion mi povas diri... Legeblas ja rakonto momente. Oni ja reale vidas tiun grandiozan barilon, irantan al la horizonto...

Jes... Kaj la titolo estas sukcesa, - daŭrigis la redaktoro. -- Estas en ĝi iu elemento de neatendeco... Barilo - kaj, subite!, ĉirkaŭ la Tero. La legantoj tion ŝatas...


-- Ŝatas, - konvinkinte reehis la aŭtoro. -- Mi konas nian legantaron.

La redaktoro kapjesis. -- Do, ĉe mi restis nur unusola demando.


Tiu ĉi barilo... Kial ĝi estas konstruata? Por kia celo?

La aŭtoro ĵetis al la redaktoro nekomprenan rigardon.

-- Kiel do por kio? - redemandis li. Ja se ĝi ne ekzistos, nepre iu de la Tera rando suben falos!..



Tiu ĉi estas silueto de la urbodomo en granda gubernia urbo de Rusio



En la vertikalaj ek de ciferoj necesas diveni vortojn. Poste al ĉiu vorto aldoni po unu litero en la supra libera ĉelo, tiel, ke en ĉiu vertikalo rezultiĝu tute alia vorto. En la supra horizontala linio vi legos la nomon de live menciita urbo

1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12	


1. meblo por dormi; 2. elemento de homa aŭ besta skeleto; 3. en ĉambro estas planko, plafono, ...; 4. oficiala grava faro aŭ decido; 5. malofte; 6. ekzisti; 7. malgranda besteto, kiu alte saltas; 8. herbo kun forta gusto kajodoro, kiun oni ofte aldonas en kolbasojn kaj aliajn manĝojn; 9. granda kreskaĵo kun radiko kaj branĉoj; 10. speco de haroj, kiun oni ordinare prenas de ŝafoj aŭ kaproj kaj faras vestojn; 11. arkforma akvomaso, kiu leviĝas kaj refalas ĉe la supraĵo de la maro, lago...; 12. malgajo pro senintereso.

Se okazos miskompreno, povas veni ĉagreno

Prefikso de eraro

trovu la prefiksom *mis-* en la sekvaj vortoj:

mistero, miskalkulo, misilo,
misedziĝo, miskoni, mistifiki,
miskonduto, misiisto, mistiko



Prefikso de ripeto

trovu la prefikson *re-* en la sekvaj vortoj


redoni, restarigi, respondi
regali, reagi, rekoni, rekordo,
regulo, rebuso, regiono, refari,



En la komenco la plej bona potenco!

Komenco bona - laboro duona! Komenciĝis la 1998-a jaro. Kaj la gazeto KOMENCARTO por la tuta 1998 jaro anoncas konkurson pri la proverboj, kiuj havas la radikon *komenc-*. La partoprenantoj de la konkurso ricevos diversajn libropremiojn. Ni atendas viajn provojn!

(La tuta paĝo estas kompilita laŭ la ideoj de Timur Morgun)



el vivo de bestoj

En la dezerto rampas du testudoj. La virtestudo al ŝi-testudo: vi venenigis tricent la plej bonajn jarojn de mia vivo!

La caro de bestoj Leono invitis ĉiujn bestojn kaj ordonas: — Ĉiuj belaj liven, kaj la saĝaj dekstren.

La bestaro komencas viciĝi en du liniojn, sed la Simio frekvencas tien-reen, tien-reen... La Leono al ŝi: — Nu?

— Nu kion fari, ĉu mi devas disŝiriĝi?! — respondas Simio

— Kiu besto estas la plej stulta?

— Bovino. Mem trinkas akvon, sed por aliaj donas lakton.

Katino postkuris muson, sed tiu sukcesis forkuri en trueton. La katino proksimiĝis al la trueto kaj subite ekbojis hunde. La muso ekmiris: kiel katino povas boji kaj elŝoviĝis el trueto. La katino ĝin tuj formangiĝis. Poste ĉirkaŭlekis la muzelon kaj diris:

— Kiel estas utile koni almenaŭ unu fremdan lingvon.

Leter kesto

Estas agrable ricevi leterojn. Agrablajn leterojn des pli agrable. Ankaŭ kritikaj leteroj estas utilaj. Hodaŭ ni publikigas kelkajn reeĥojn de la legantoj kaj invitas vin aktive partopreni en KOMENCARTO

Bonorde mi ricevis la 12-an numeron de via periodaĵo kaj opinias ĝin tre inda kaj aktuala ĝuste por novicoj, kiuj eble eĉ timas pli seriozajn periodaĵojn. Per facila lingvo en via periodaĵo eblas rakonti multon. Sukcesojn al vi!

(Dmitrij Cibulevskij, 310003, ab. skr. 9307, Ĥarkiv, Ukrainio)

Ĝus mi ricevis la du lastajn numerojn de KOMENCARTO pri kiu ĝis nun, bedaŭrinde, sciis nenion, sekve via periodaĵo frape surprizis min. Tamen ekzistis en mi jenaj duboj:

1-e: Estas iluzio opinii ke unusola gazeto povas servi ĉiujn aĝogrupojn, de infanoj ĝis profundaĝuloj.

2-e: En Esperantujo kreskas la periodaĵoj kiel herbo post la unua printempa sunbrilo. Ilia nivelo ne povas esti alta ĉar mankas financaj rimedoj. Ĉu ne estas pli prudente kunigi la fortojn kaj koncentri al nur kelkaj kaj levi ilian nivelon...

(Geza KURUCZ, redaktoro de "JUNA AMIKO",

Hitel u.10.ŝzt.16, HU-6000, Kecskemet, Hungario.)

Dankon pro via letero kaj la revuo KOMENCARTO. Laŭ mi estas bona ideo havi tian revuon, kaj mi volonte estos via peranto en Svedio... Mi deziras al vi bonan sukceson en via laboro.

(Lisbet Anderasson, peranto por esperantorevuoj en Svedio, Södra Rörum pl 455, SE-24294 Hörbu, Svedio.)

Kun plezuro mi tralegis vian ĵurnalon Æ. Sendas al vi kelkajn versaĵojn de nia fama urba e-poeto *Nekonatulo*.

Sukcesojn! (Demjaŝev Oleg, prezidanto de E-klubo "Gaja Krokodilo", 423819, ab. ja.133, Nabereĵnije Ĉelni, Tatarstan, Rusio)

Ĉina Radio Internacia

Esperanto-Sekcio

CN-100040, Pekino, Ĉinio

Horaro de Esperanta Disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia en Esperanto

11.00 - 11.30 Japanio, Koreio	41,84 m (7170 kHz); 31,46 m (9535 kHz);
13.00 - 13.30 Sudorienta Azio	25,86 m (11600 kHz); 25,34 m (11840 kHz);
20.00 - 20.30 Eŭropo	40,51 m (7405 kHz); 30,11 m (9965 kHz);
22,30 - 23.00 Latinameriko	30,43 m (6860 kHz); 43,17 m (6950 kHz);



KORESPONDU!

Ĉiu kadro kostas 3 rublojn aŭ 2 Internaciajn Respondkuponojn
Por pagintaj abonantoj de ✠ - senpage

*Japano Esperanto-
Koresponda-Servo*
konstante akceptas korespondajn proponoj kun japanoj. Skribu unuope al:
KLEG, Sonehigasi,
1-11-46-204, Toyonakasi 561, JAPANIO

Savina Tatjana
22 ja., hundoj, naturo
postrestante
IDRICA,
Pskovska obl,
182240,
RUSLANDO

*João Ferreira
da Silva,*
memlernanto de E-to
Av. Sebastião Pereira,
772, BR-78655-000,
Porto Alegre do Norte-MT
BRAZILO

*Kalinčuk Jurij
Andrjeevič,*
67ja., sporto, literaturo,
pentrarto
ab. ja. 10, NIKEL,
Murmanska obl,
184420,
RUSLANDO

*Saveljeva Antonida
Pavlovna,*
38 ja., filozofio, muziko,
historio
50 let Oktjabrja, 22-69,
KUDIMKAR,
Permska obl, 617240
RUSLANDO

f-ino Akudo Achilike
25-jara studentino korespondus nur kun viroj interesaj kaj ankoraŭ ne edzigitaj, pri ĉ.t.,
P.O.Box 3059,
Owerri, Imo State,
NIGERIO

Ĥajdarova Violetta
15 ja., lingvistiko, katoj
Sverdlova, 48/2-52
SIBAJ,
Baŝkirio,
453640
RUSLANDO

Fusacugu KIDO,
pri diversaj temoj
Gamoo Higasi 6-51,
Kosigaja, Saitama,
343
JAPANIO

*Marzena
Sposzynska*
16-jara lernantino, kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj
ul. Kraszewskiego 4 m.
59, 87-100 Torun,
POLLANDO

Kononova Sneĵana
19 ja., literaturo, rokmuziko
Trudovaja, 35-3
Nijnjaa Omka,
Omska obl., 646620,
RUSLANDO

Sabimbona Peresi.
24-jara instruistino,
komencanta, deziras korespondi tutmonde,
Kuleana, Box 27,
Mwanza,
TANZANIO.

Ŝumakov Andrej
19 ja., lingvistiko,
historio
Lesnaja, 34/26-5
Severodvinsk,
Arĥangelska obl.,
164520
RUSLANDO

Volkov Aleksandr
22 ja., sporto, muziko
Matrosova, 44-19
TOLBAZI,
Baŝkirio,
452280,
RUSLANDO

s-ro Nils Johansson,
interesiĝas pri poŝtmarkoj.
Skeppståyagen 20,
12430 BANDHAGEN,
STOKHOLM,
SVEDIO

Nasonov Aleksandr
15 ja., sportas,
desegnas
ul. Dubrovka,
Ĉ-NIKOLSKOJE,
Lipecka obl.,
399450,
RUSLANDO

George Abraham,
okupiĝas pri koresponda kurso de E-to
Avenida Alem 62,
2600
Venado Tuerto,
ARGENTINO

Sotnik Elena
22 jaroj, literaturo,
germana lingvo
ul. K-Marksa, 94-2
TAMANJ, 353545
Kkasnodarskij kraj,
RUSLANDO

*Denisova Lucia
Gavrilovna*
70-jara, popola kuracado, trikarto
Dzerĵinskogo, 30-32,
MIKUNJ
Komi Resp., 169060,
RUSLANDO.

KORESPONDI... listo de dezirantoj korespondi enhavas pli ol 45 adresojn. Sendu vian anoncon por senpage enpresigo; aldonu 2 Internaciajn Respondkuponojn, se vi deziras ekzempleron. Lastan eldonajon vi ricevos sendante unu IRK aŭ 10 adresojn de seriozaj esperantistaj korespondemuloj el diversaj landoj.
R.MELO, 34, Avenue de Russie, FR.03700
BELLERIVE S/Allier, FRANCIIO

ВЕСТИК ЭСПЕРАНТО

Estas eldonata en St-Peterburgo. En ĝi estas publikigataj ruslingve lekcioj pri E-to, lecionoj de E-to, praktikumo por tradukistoj, dulingva kantaro k.a. Sendu koverton por senpage ekzemplero: 197022, St-Peterburg, ab. ja. 381, Rusio, Abolskaja Meri Salomonovna

